



Direktoro P-o Em. PELTIER

Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro. Manuskriptoj neniam estos resendataj.

ABONEJOJ de E. K.

- FRANCLANDO : Ĉe la Direktoro de E. K., kaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris V^e.
- ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
- BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
- BOHEMUJO-AŬSTRIO: F. Topič, libr. Ferdinandova 9. Praha.
- ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
- HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO. —
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRICO DI PORDENONE (Udine).
- HISPANLANDO : S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
- GERMANLANDO : Moller et Borel, 95, Prinzenstr. Berlin.
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, Warszawa.
- RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. Peterburgo.

Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responde nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro.

PRESEJO A. BARBOT
15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : { En Francando : 4 frankoj. | **Unu numero :**
 Ekster — 5 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4^{na} paĝo : 4 fr. ; 8^{na} paĝo : 2 fr. 50 ; 16^{na} paĝo : 2 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : por tri fojoj 10 % ; — por ses fojoj : 15 % ; — por 10 fojoj : 20 %.

CIDRNULINO, KUN SES ILUSTRAĴOJ
 N-^o DUA DE LA ILUSTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO
 por infanoj.

ĴUS APERIS : 0 fr. 50 afrankite.

KATO KUN BOTOJ kaj **CINDRULINO** kune mendataj kostos nur 0,75, afrankite.

HO, MIA KOR : Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Muziko de S-ino José GUVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo : 1 fr.

BALDAU AĈETEBLAJ

En songo, poezio de D-ro Zamenhof, muziko de S-ino José Guivy 1 fr. 60

Himno, poezio de Profesoro Dombrowski, muziko de S-ino José Guivy 1 fr. 50

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(La tuta kolekto ĝis marto 5 fr. afrankite). **Artikoloj legindaj en la kolekto :** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj largaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrowski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée ; skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj. lingvaj ; kaj informoj pri la 1-a Kongreso Esperantista. ktp. ktp.

ESPERO KATOLIKA

ENHAVO

	Paĝoj
EM. PELTIER : Letero al la Lingva Komitato	97
SPCIMENO DE ESPERANTO kun alfabeto senakcenta	100
RELIGIA MOVADO : en Aŭtrio; — en Anglujo; — en Franclando.....	103
P. A. DOMBROWSKI : Letero malkovrita al S-o Em. Peltier.....	103
SOCIETO POR RELIGIAJ ESPLOROJ.....	107
PIERRE L'ERMITE : Mirinda aventuro okazinta al la monujo de Sinjoro Boulard (trad. P. C.).....	107
PAĜO DE LA GELEGANTOJ.....	112
ELEDA KAJ VINKO : La lasta Abenceraĝo (sekvo).....	113
EN ESPERANTUJO : Revuo de la revuoj. — Dua Kongreso Esp.....	118
Notetoj. — Bibliografio — Aboamonoj ricevitaj — Ŝakoj	123

LETERO AL LA LINGVA KOMITATO

PRI LA LITEROJ SUPERSIGNITAJ.

Estimata Prezidanto.

Mi baldaŭ troviĝos en granda embaraso. Tial mi turnas min al la *Lingva Komitato*, por ricevi *precizan kaj rapidan solvon* pri la supersignitaj literoj. Mia presisto baldaŭ havos nur la kompostajn maŝinojn, kiujn oni nomas *linotipoj*. Li ne volas aĉeti linotipojn kun supersignitaj literoj, tial ke : 1-e, li ne presas sufiĉe da Esperanto por okupi unu linotipon ; 2-e, linotipo kun supersignitaj literoj estus tre maloportuna kaj ĝena por komposti nacian lingvon.

Mi do baldaŭ troviĝos en la sama embaraso, kiel la *Lumo*.

Plie se mia revuo, *Espero Katolika*, estus presita per linotipo, tio ŝparus multe da mono kaj da laboro. La korektaĵoj farotaj ĉiumonate estas preskaŭ senfinaj..... Mi ne povas postuli, ke ĉiuj kompostistoj lernu Esperanton. — Kontraŭe se la kompostado estus farata de unu kompostisto, mi povus facile postuli, ke li lernu Esperanton.

Mi do baldaŭ bezonos alfabeton sen supersignitaj literoj. Sed... kian mi devos uzi ?

Laŭ mi, jen la principoj proklamindaj pri la demando de supersignitaj literoj :

1-e. *Antaŭ ĉio, oni devas deklaracii, ke, la alfabeto kun literoj supersignitaj estas la vera alfabeto de Esperanto, kaj sekve estas plej dezirinda, ke la presistoj aĉetu literojn signitajn, kiel ili aĉetas grekajn aŭ germanajn, ktp., kiam estas necese.*

2-e. Oni ne povas nei, ke, *flanke de la alfabeto de Esperanto*, ni bezonas *egalcvaloran alfabeton por la okazoj, kiam la presistoj ne havas aŭ ne volas havi literojn supersignitajn*.

Tio estas tiel vera, ke D-ro Zamenhof mem proponis, en la *Fundamento de Esperanto*, anstataŭi ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, per ch, gh, hh, jh, sh, u.

Vi ja tuj diros al mi « Nu, tio, kion vi petas, estas jam farita ! »

Jen la punkto diskutinda kaj jam tre diskutata de la plej lertaj Esperantistoj. La L. K. mem kredeble ne estimis la problemon solvita, ĉar ĝi proponas al ni, per D-ro Javal, alian alfabeton. Persone mi kuraĝas diri, — ne forgesante la respekton, kiun mi ŝuldas al nia Majstro, — ke la alfabeto senakcenta proponita en *fundamento de Esperanto*, ne estas akceptebla, tial ke ĝi kontraŭdiras *fundamentan leĝon de Esperanto*: **unu litero por unu sono**. La litero h havas specialan sonon en la alfabeto, kaj plie ĝi havas alian specialan sonon kiam ĝi anstataŭas la supersignon. Tio kreas embarasojn, kiel en la ofte cititaj vortoj : ĉashundo, ĉashoro, (chashundo), (chashoro), kiuj povus legiĝi : *cha-shundo cha-shoro*.

Bedaŭrinde ĉiuj sistemoj ĝis nun proponitaj enhavas la du sonojn por h. (Vidu la sistemojn proponitajn de S-oj Deshays, Michaux, k. a.).

La sistemo de D-ro Javal *ne evitis tiun difektaĵon, kaj plie ĝi aliformigas, ŝanĝas la lingvon mem*. D-ro Javal forigas unu el la sonoj ĝ kaj j, kaj konservas sur la sonon ĝ, esprimitan per la litero j.

Alia bedaŭrindaĵo : la diversaj dicitaj sistemoj estas pli-malpli arbitraj. Mi havas la honoron proponi al vi sistemon, kiu, mi pensas, evitas tiujn difektojn, kaj samtempe estas *racia kaj scienca*.

Oni scias, ke la greka lingvo ne havas la literon h, kaj tamen ĝi tre bone povas esprimi la h-adon (Esperantan sonon de h.), per signo, kiu nomiĝas france *esprit rude*. Tial, multaj vortoj, kiuj, en niaj romanaj lingvoj kaj en Esperanto havas la literon h, ĝin ne havas en la greka. Ekzemple : heroo (greke, 'ĉrŭs), hepato (gr. 'ĉpatos), hipokrito (gr. 'uprokrita). Same por hidrogeno, herezo, harmonio, heliko, ktp. ktp.

Mi do proponas anstataŭi la literon *h* per signeto, kiu troviĝas en ĉiuj presejoj, kaj ankaŭ en la linotipoj; *per apostrofo*. Ekzemple: *'eroo*, *'epato*, *'ipokrito*, *'onoro*, *'idrogeno*, *'ereso*, ktp.

Bonvolu rimarki, ke jam la Itala lingvo — en tiuj vortoj kaj en aliaj multaj — ne konservis la literon *h*. Ekzemple: *arpa* (harpo), *aringa* (haringo), *erco* (heroo), *erezia* (herezo), *onesto* (honesto), *ora* (horo), ktp.

La anstataŭo de *h* per signeto estas do *lingva*, *sciencia* rimedo, jam ekzistanta en la greka lingvo.

Se oni ĝin akceptos, oni nun facile povos forigi ĉiujn supersignitajn literojn, kun la helpo de *h*, kiu estas litero disponebla. ŝ fariĝos *sh* (jam uzita en angla lingvo).

ĉ — *ch* (jam en angla lingvo).

ĝ — *gh* (preferinda je *dj*, pro la *grafismo*).

ĥ — *kh* (aŭ simpla *h*, kiam tio ne povas krei konfuzon).

Estas en la *Fundamenton de Esperanto* nur 5 vortoj komencantaj per ĥ: *ĥaoso*, *ĥemio*, *ĥimero*, *ĥolero*, *ĥoro*. — Nur « ĥoro » kaj « ĥolero » povus konfuziĝi kun *ĥoro* kaj *ĥolero*; tial estas neceseskrivi: *kĥoro*, *kĥolero*. La aliajn oni povus facile skribi, *kaoso*, *kemio* (jam uzita de *Scienca Revuo*), *kimero*.

Restas nur la litero ĵ. Ĉiuj sistemoj proponas ĝin anstataŭi per ĵ; kaj alpreni y por la sono ĵ. Mi kredas, ke tio estas tre logika kaj racia. Mi do proponas ankaŭ

Ĵ fariĝos ĵ.

ĵ — *y*.

ŭ — *u* (kiel estas proponita de D-ro Zamenhof).

Per tia sistemo alfabeto ni havus lingvon, kiu povus estis facile telegrafata, maŝinskribata, kaj « linotipata »!

Antaŭ ol fini mian peton, mi *insiste rediras* ke la sistemo proponita de mi *ne celas la forigon de supersignitaj literoj, sed nur la alprenon de sistemo uzbla por ĉiuj, kiuj ne povas, pro kia ajn kaŭzo, uzi la literojn supersignitajn.*

Esperante respondon precizan kaj ne tro prokrastitan, mi petas vin, Estimata Sinjor' Prezidanto, akcepti la esprimon de miaj respektplenaj sentoj.

EM. PELTIER, L. K.
Direktoro de *Espero Katolika*,
La 2-an de junio 1906.

SPECIMENO

DE ESPERANTO KUN ALFABETO SENAKCENTA

Preskau chiuy presejyoy en Kanado 'avas linotipojn. Tial antaŭ du jaroj *La Lumo* chesis aperi, nepovante plu presighi per literoj sursignitaj. S-o Saint-Martin metis la demandon antaŭ la Kongreso de Boulogne. La demando estis resendita al la *Lingva Komitato*. Għis nun la L. K. ne solvis la demandon. Ĉu ĝi ankau resendas la demandon al la dua Kongreso, kiu ĝin resendas al la definitiva L. K., kiu... ! Tio estus iom ridinda kaj montrus plenan senpovecon kaj senutilon de L. K.

(Presita per linotipo.)

RELIGIA MOVADA

La religia situacio Eble oni kredas en eksterlando, ke la ka-
en Aŭstrio : tolikoj en Aŭstrio vivas en plena religia trankvilo, ĉar la granda mondo nenion aŭdas pri tiel gravaj aferoj, kiel okazas nun bedaŭrinde en Francujo. Certe ĉe ni en Aŭstrio, la batalado inter kreduloj kaj sendiuloj ne aperas en perforta formo; oni ne bezonas defendi preĝejon per armiloj, kaj sangaj atestantoj de nia kara religio ne ekzistas en Aŭstriaĵ landoj. Tamen la malamikoj de l'Eklezio ankaŭ tie ĉi senlace klopodas por ruinigi iom post iom la sur Petro fundamentitan majestatan konstruaĵon, kiu daŭris jam dum tiom da jarcentoj, spite ĉiuj eĉ plej perfortaj atakoj, kaj daŭros, laŭ la vortoj de ĝia fondinto, ĝis la fino de l'tempoj.

Kiel plej fervoraj kontraŭuloj nature prezentas sin la *framasonoj*, kies societo ja ne estas oficiale tolerata de l'registararo, sed kiuj tamen ekzistas, unuigitaj en la hungaraj loĝioj, havas siajn sekretajn kunvenojn en la aŭstria ĉefa urbo Vieno, kaj laboradas laŭ ordonoj, kiujn ili ricevas de la ĉefloĝioj el eksterlando. Nuntempe la milito ĵus komencita koncernas la *junularon* kaj la *edziĝon*.

La unua afero estas tiel grava kiel la dua. Oni ja scias ke la venontaj generacioj dependas de la estanto, kaj tial disigi de Dio kaj Eklezio la junularon estas tre danĝere. La rimedo por tion alkonduki, kaj eĉ la plej facila kaj sukcesa troviĝas en la

lerneja instruado. Oni subfosu nur la dogmojn, mirindaĵojn, k. a. per konvenaj tezoj de l'natura historio, historio kaj aliaj instruadoj, samtempe oni forigu el la lernejoj la signon de nia kredo — la Krucon, — kaj la preĝojn — Patro nia kun Anĝela Saluto : kaj oni prosperos igi senreligiaj la delikatajn animojn de l'infanoj, kiuj baldaŭ komencos malkonfidi al katekismo mokita, al katolikaj tezoj de l'kredo, eviti la « enuigajn » predikaĵojn kaj ĉian Diservon ; kaj fine ili fariĝos senkredaj, sendiaj.

Kun anaro tia oni facile batalos poste kontraŭ Eklezio pli forte kaj ankaŭ kontraŭ trono, — la dua celo de l'framasonaj klopodoj ĉe ni, kie ankoraŭ regas imperiestro katolika. Tiam post mallonga paŭzo aperis denove la malamiko en formo de unuiĝo nomita « Libera Lernejo », kiu postulas la suprecititajn aliigojn de la leĝo por publika instruado ĝis nun ekzistanta, jam sufiĉe liberala. Tiu « Unuiĝo » postulas nur moralan edukon de l'junularo, — kaj eĉ tio estas ankoraŭ tro danĝera por la deziroj de la senkreduloj.

Feliĉe jam de longe ekzistas, etendita sur la Austrio, forta katolika « Unuiĝo », nome *Katolika lernejunuiĝo*, kiu enhavas preskaŭ 61.000 anojn kaj elspezas ĉiujare ĉirkaŭe 214.000 kronojn por la katolika edukado (lernejoj, seminarioj por instruistoj k. t. p.) Tiu ĉi, oni esperas, estos forta barilo kontraŭ la ĵus priskribitaj celadoj.

La dua atakpunkto estas la edziĝo katolika. Ĉe ni ĝis nun civila edziĝo inter katolikoj estas malpermesita. Tial laŭ leĝo neniu katolika edzo aŭ edzino post edziĝo povas denove edziĝi dum vivas ankoraŭ la alia parto. Tiel la leĝo konsentas kun la katolika dogmo pri edziĝo. « *Unuiĝo de edziĝintaj geedzoj,* » fondita antaŭ ne longe, iniciatis nun grandan propagandon por reformo de l'nuna edziĝa leĝo, postulante ke tiu paragrafo estu forigata, kiu ordonas la needziĝeblecon de eksedziĝintaj katolikoj dum vivo de l'alia parto. Oni kolektas subskribaĵojn por influi la parlamenton, la leĝdonantan korporacion kaj oni celadas la civiledziĝon ankaŭ en Aŭstrio, kiel ĝi ekzistas jam de kelkaj jaroj en Hungarujo.

Sed feliĉe, — kaj tio estas ankoraŭ ilia forto, — la katolikoj aŭstriaĵoj estas unuigitaj en multe da unuiĝoj, kiuj kune kontraŭbataladas energietiajn celadojn per grandaj publikaj kunvenoj

klarigantaj la nespertulojn kaj plifortigantaj la konvikitajn katolikojn. Cetero nia parlamento havas nun pli gravajn zorgojn ol plenumi la dezirojn de l'framasonoj kaŝitaj sub kovrilo de liberaloj, social-demokratoj, plengermanoj, k.c. Sed tio estas alia temo. Tiujn ĉi aferojn mi rakontis nur por montri al Francujo, kion la tieaj katolikoj bezonus por firme kontraŭstari la frenezajn atakojn de l'malamikojn de nia eklezio. Ili bezonus fortan organizacion en unuiĝoj grandenombraj, laborantaj unu kun la alia por konservado de nia religio sankta. Se en ĉiu urbo en ĉiu vilaĝo ekzistus tiaj unuiĝoj ĉu politikaj, ĉu religiaj, tiam la atakoj de l'kontraŭuloj povus esti rebatataj sen sango kaj teruro, nur per forto de l'popolamaso superanta, per la glavo de la lango, per la akreco de l'spirito kun helpo de l'boneco de nia afero. Ne estas tro malfrue por komenci tiun ĉi unuiĝon, kaj ĵus nun, meze de l'bataladoj, oni trovas la plej bonan okazon por kolekti la kredulojn sub la signo de l'kredo. Nature la pastroj estas la difinitaj organizantoj por ekpreni tiun ĉi rimedon, la solan, kiu iam helpis en tiel gravaj tempoj *Concordia parvae res crescant*. (Per unuiĝo kreskadas malgrandaj aferoj).

J. SCHRODER, el Aŭstrio.

Letero el Anglujo. — « *The Time* » (la plej grava angla ĉiutaga ĵurnalo) presis leteron adresatan al ĉiu kristana pastro, subskribatan de la ĉefepiskopoj de la angla eklezio kaj de la estroj de ok protestantaj eklezioj en Anglujo kaj Skotlando; el tiu letero ni citas jene:

« Ni riprezentas vaste diferencajn kristanajn komunumojn. Ni interkonsentas malŝati ian grandan skemon por laŭ eklezia unuiĝo, kiu ŝajnas al ni trofrumatura; ni interkonsentas malŝati penadojn por trakti niajn ekzistantajn diferencojn kvazaŭ ili estas ne gravaj; sed ni ankaŭ interkonsentas kredi firme ke nia Sinjoro Jesu Kristo intencis ke ni estu en videbla kunuleco. Ni sentas profunde la paralizan efekton ĉe la moralaj fortoj de Kristaneco, kiun niaj dividiĝoj nepre naskas. Ni estas plene konvikitaj, ke la devo de ĉiuj kristanoj, kiuj deziras la plenumon de la Dia celo, estas sin turni al pentado kaj preĝado; al pentado, ĉar ni ĉiuj, laŭ diversaj vojoj, eklezie kaj individue, partoprenis kaj kuniĝis por naski ka

daŭrigi diferencojn: al preĝado ĉar ni ĉiuj egale bezonas ke Dio malfermu nian spiriton kaj koron, por ke ni akceptos sen antaŭjuĝo la gradan riveladon de Lia volo rilate al la vojoj laŭ per kiuj ni kuniriĝos.

« Tial ni petas ĉian kristanan pastron en Anglujo, pretigi sian kongregacion por kuna preĝado je Pentekosto por la reunuiĝo de Kristanoj ».

La katolika ĉefepiscopo de Westminster, mallonge respondis ke kvankam li tre simpatias je la celo de l'alvoko, li ne povas, pro la kutimo kaj la tradicio de sia eklezio, subskribi komunalvokon por specialaj preĝoj. Li sentas ke li pli bone helpos se li laborados laŭ tradiciaj linioj.

Jam tri el la anglaj eklezioj traktas reciproke por unuiĝo, nome, la Unuiĝinta metodista eklezio, la Metodista nova kunligo, kaj la Bibliaj kristanoj. Iliaj diferencoj nur tuŝas la organizadon kaj la regadon de la kongregacioj kaj neniel koncernas la dogmaron. Oni povas preskaŭ diri, ke ilia unuiĝo baldaŭ estos plenumita fakto.

J. ELLIS, el Keighley (Anglujo).

En Francando La politikaj priokupoj prenis, de kelkaj semajnoj, la tutan tempon kaj spiriton de la Francoj, kaj oni lasis iom flanke la religiajn aferojn. Sed baldaŭ la « religia demando » reviviĝos pli akra kaj pli neprokrastebla. La ĝenerala opinio nun estas, ke la katolikoj ne povas krei « societojn kultajn » laŭ la principoj priskribitaj de la leĝo, por transdoni al ili la bienojn apartenantajn al la paroĥoj. Tamen la franca episkoparo kunvenis en Parizo, la 30-an de majo, por doni al la Papo sian oficialan opinion pri tiu punkto kaj pri aliaj aferoj. Post tiu Kunveno (kiu ne estas Konsiliĝo) la Papo donos praktikajn instrukciojn al la francaj katolikoj.

MAKOVRITA LETERO AL S-ro EM. PELTIER. ¹

Tre estimata Sinjor' Direktoro kaj kunfrato !

« Kun granda plezuro mi tralegis vian ŝatindan leteron al ĉiuj pastroj kristanaj. Jes vi estas prava, ekparolinte pri la

¹, Publikigita en N.º aprila de *Ruslanda Esperantisto*.

Unuiĝo de l'Kristanaro. Se la momento de tiu unuiĝo eble ne ankoraŭ alvenis, tamen ĝi ŝajnas komencinta alproksimiĝadi. Tial estas ĝusta tempo pri ĝi nun ekpensi kaj eĉ publike ekparoli.

Eksplorante la ĝisnunan kristanaran historion oni facile vidas, ke ĝi estis nenio alia ol la periodo de kontinua ĉiaspeca diferenciĝo.

« Kaj, efektive elirinte el unu komuna fonto de l'sankta skribo kaj tradicio, la kristanaro, de l'unuaj tagoj de ĝia ekzistado, ekkomencis penene serĉadi la *Eklesian Idealon* kaj la plej perfektajn eksterajn formojn por ĝia realigo sur la tero. El tiu ĉi serĉado devenis ĉiuj skismoj, ĉiuj herezoj kaj ankaŭ ĉiu nun vidata diverseco en religiaj dogmoj, en kanonaj leĝoj, en ekleziaj liturgioj, en sakramentaj ritoj, ktp.

« Kion opinii pri tiu proceso diferenciĝa? Ĉu ĝi estas absolute kontraŭdia? Mi ĝin diri ne kuraĝas. Kontraŭe, memorante la vortojn de S. Paŭlo *oportet et haereses esse*, mi permesas al mi pensadi, ke en la ĝenerala Dia plano eĉ herezoj kaj skismoj kavas sian necesindecon, ke ili estas siaspecaj « feliĉaj kulpoj », analogiaj je kulpo de niaj unuaj gepatroj, kaj neniel pli gravaj ol tiu ĉi lasta.

« Sed aliflanke, konfesante la historian necesindecon de skismoj kaj herezoj, oni povas neniel defendadi ilian *absolutan* necesindecon por eternaĵo: tempe Dio permesis, ke ili ekzistu, sed Li ne volas, ke ili daŭradu *eterne*. Dia volo estas ja klara: *ke ĉiuj estu unu!* Tial post la ĝisnuna periodo de *diferenciĝo kaj de partumiĝo* devas veni la kristana *unuiĝo kaj tutiĝo*. Tiu ĉi lasta proceso estas tiel same en Dia plano, kiel la proceso ĝin antaŭirinta.

« Bedaŭrinde la Dia volo, — ke ĉiuj estu unu, — restadis ĝis nun de l'kristanoj ne sufiĉe komprenita kaj neplenumita.

« Anstataŭ esti fratoj en Kristo, ili fariĝis malamikoj pro Kristo. Zorgante nur pri la *Kredo* ili strange forgesis pli grandan virton *la amon*. Oni celadis la *unuiĝon en kredo*, forgesante ke ĝin devas antaŭiri la *unuiĝo en amo*. Sen amo estas nebla unuiĝo de homoj, kiel sen fajro fortika — la unuiĝo de metaloj. Ju pli varma estos nia reciproka amo, des pli facila estos nia unuiĝo, des pli granda estos nia forto. Nune estante

dividitaj, ni estas tute malfortaj rilate al religiuloj nekristanaj; ĉar al prediko de niaj misiistoj — ĉiu mohametano, hebreo aŭ idolisto prave ja povas diri: ni vin aŭskultos kiam vi mem plenumos la ĉefan ordonon de via Majstro pri unuiĝo; nune do per via reciproka dividiĝo, vi nur al ni montras ke via religio estas ne plumebla kaj tial malvera. Ni ne volas kun vi disputi; por ni sufiĉas la fakto, ke vi kristan instruon aŭ ne kromprenas, aŭ ne plenumas, ĉar alie vi estu *unu* kaj instruus same, *kion ni nune ĉe vi ne trovas*.

« Kaj kion ni povas respondi al tiuj ĉi riproĉoj? Nenion! Tial se ni ne volas esti mokataj de l'nekristanaro, ni devas peneme ekkomenci la zorgon pri nia unuiĝo. Sed kiamaniere??

« Vi francoj bone diras: *tout comprendre c'est tout pardonner*. Kaj efektive el maldeziro ĉion kompreni devenis maldeziro ankaŭ ĉion reciproke pardoni kaj la rezulto de tiu ĉi maldeziro estis la divido de l'kristanaro en tri grandajn ĉefajn partojn: katolikan, ortodoksan kaj protestantan. Tial la unua kaj ĉefa devo de l'nuna kristanaro estos: penadi ĉion kompreni. Sed ĉu ni povas ĉion kompreni? Kial ne? Ni ja ne vane havas la saĝon.

« Kiel ni supre montris la Kristanaron dividis la unuaflankeca celado al la Eklezia idealo. Por la parto katolika, preninta kiel ĉefan principon la *aŭtoritaton*, la Eklezia idealo montriĝis en la *absoluta monarkia unueco*. Por ĝin atingi oni laboradis dum la jarcentoj fortikigante la centran potencon de Roma ĉefepiskopo. La parto Orientortodoksa, opiniante, ke la Eklezia unueco devas esti *bonvola, nedeviga*, proklamis la principon respublikan de *absoluta sendependeco* inter apartaj naciaj Eklezioj. Laŭ tiu ĉi principo la idealo de Eklezio estas realiĝinda nur per la unueco sin fondanta ne sur la *forto de leĝo*, sed sur la *fortego de amo*. Fine la protestanta parto, defendas la rajton de saĝo kaj de homa individueco, ekprotestis kontraŭ la principo de absoluta aŭtoritato kaj pensis fondi la idealon de Eklezio sur la *absoluta libereco* en la kredesploro.

Antaŭ jarcentoj oni povis dubi kaj disputadi pri Kristaneco aŭ ne kristaneco de suprediritaj tri ĉefaj principoj. Sed nune... kiu ja ekkuraĝos opinii, ke la religia aŭtoritato estas absolute malnecesa aŭ ke la religia sendependeco absolute kontraŭas al Krista instruo, aŭ ke la libera serĉado de religia veraĵo absolute

kondukas al la krederoj ? !. Kontraŭe hodiaŭ ĉiuj kristanaj pensistoj pli aŭ malpli klare konfesas, ke malbonaj kaj forĵetindaj estas nek religia aŭtoritato, neke kleria sendependeco, nek libera kredesploro, sed nur *iliaj malbonuzoj*.

La libera kredesploro, se ĝi estas *vere libera*, ligita per *nenia antaŭjuĝo*, povas la protestantaron libere alkonduki al la akcepto de la deva aŭtoritato en religiaj demandoj kaj tiamaniere elmontri la *neceson de nova reformo* por la protestanta Eklezio. Simile la vera eklezia sendependeco, se ĝi estas efektive *vera*, ligita per *nenia antaŭjuĝo*, ne esceptas la eblon de libera unuiĝo kaj de komuna religia vivo inter la orientortodoksaro kaj la du aliaj ĉefpartoj. Fine ka la ĉefa aŭtoritato, tute ne kunigebla kun *malbonuzoj* de malĝusta sendependeco kaj libereco en la kredesploro, estas plene konsentigebla kun *vera sendependeco* de apartaj eklezioj kaj *vera libereco*, dank'al la principoj de S. Aŭgustino : *Ama Deum et fac quod vis — vi amu la Dion kaj faru, kion ajn vi ekvolos !*

Vi francoj diras « *tout est juste à sa place* » — kaj estas pravaj. Uzante tiun vian nacian diron, mi kuruĝas ankaŭ ekdiri : ĝustaj estas ĉiuj tri ĉefprincipoj kristanaj kaj de ĉefa eklezia aŭtoritato, kaj de eklezia sendependeco, kaj de libera kredesploro, sed en siaj *ĝustaj limoj*.

Tial, laŭ mia opinio, se oni volas ĝuste solvi la demandon pri unuiĝo de l'kristanaro, trovi la ĝustan vojon por tiu ĉi unuiĝo, oni devas trovi kaj difini la suprediritajn *ĝustajn limojn* de tri ĉefaj kristanaj principoj, pri kiuj mi ĵus parolis. Sed kiu kaj kia maniere ilin oni povas trovi ? jen estas alia granda demando.

La glora Plato sur la pordo de sia lernejo estis metinta la subskribon : « *neniu, geometrion nescianta, tien ĉi eniru !* » Kaj li estis prava, ĉar nescianta geometrion, t. e. nekutimiĝinta al preciza scienca pensado, ne estas sufiĉe kapabla por sin utile okupi per filozofiaj demandoj. Ion similan oni ankaŭ povas diri pri la personoj, volantaj sin okupadi per la demando pri la Unuiĝo de kristanaro. Ĝi estas demando tre vasta kaj tre malfacila. Por ĝin solvi, oni devas « *ĉion kompreni kaj ĉion pardoni.* » Tial imitante Platon, vi povas meti sur vian revuon la subskribon : « *Neniu kun mallarĝa sagô kaj mallarĝa koro tien ĉi envenu !* » Dezirante plej varme ke vi trovu inter la alvokitaj

kristanaj pastroj la plej grandan nombron da pastroj esperantis-
taj, *liberaj de saĝmallarĝeca malsano* kaj tial kapablaj ĝuste
solvi aŭ almenaŭ prepari la ĝustan solvon de la plej grava nun-
tempa demando pri la fina unuiĝo de l'kristanaro, mi restas
je vi kun vera estimo kaj kunfrata saluto.

Via en Kristo. P-ro. A. DOMBROVSKI.

I-IV-06. S. PETERBURGO

SOCIETO POR RELIGIAJ ESPLOROJ

Dum la pasinta jaro fondiĝis en Parizo la « *Societo por Reli-
giaj esploroj* (Société d'Etudes Religieuses), dividita en du sek-
ciojn 1-e, sekcio de religia filozofio ; 2-e, sekcio de eklezia
unuiĝo. Ĝia Prezidanto estis elektita Victor Giraud, sekretario
de *Revue des deux Mondes*. Ĉu ne povus iu ella legantoj de E. K.
doni kelkajn pli detalajn sciigojn pri tiu ĉi utilega Societo kaj
ĝia laborado.

P. A. DOMBROVSKI.

(Vas. Os. 1 l. 52, S. PETERBURGO).

MIRINDA AVENTURO

OKAZINTA AL LA MONUJO

DE SINJORO BOULARD.

El « *Lisez-moi ça!* » de PIERRE L'ERMITE.

Ĉu vi vidas tiun ĉarman dometon sidantan meze de l'verdaĵo,
kvazaŭ nesto de birdo ?

Kiu povus diveni, vidante ĝin tiel koketan, tiel gracian, kun
ĝiaj rozkoloraj brikoj, ĝia tegmento el delikataj ardezoj, ĝia mal-
granda tureto, kaj ĝiaj glicinaj rubandoj, ke tie estas la loĝejo
de l'terura, de l'sovaĝa Boulard, filo de la senmortaj principoj
de 89, filo de lia laborado, kaj, krom tio, ankaŭ filo de fraŭlino
Zoé Boulard, ekslavistino mortinta estante sepdek-jara, kaj tra
civile enterigita en luksan tombon ĵus konstruitan, kiu kostis dek
du mil frankojn.

Nuntempe Boulard ne sentis eĉ la plej malgrandan deziron
ekloĝi kun la aŭtorino de sia vivo. Posedanto de larĝa apetito,
li rigardis sentime al la estonteco, inter sia kuirejo kaj sia mon-
kaso.... la du ĉefaj priokupoj en lia vivo.

Li eĉ estis akirinta, dum unu el siaj vojaĝoj en Parizon, mirindan kuiristinon, kiu artekuiris la ŝafpiedojn *à la poulette*, en maniero tiel supera, ke, iom post iom, kaj festeno post festeno, la ventro de Boulard plirondiĝis, vojiranta al la perfekteco, kiu ĉiam efektiviĝas, kiel vi scias, per kurbaj linioj.

Krom tio, imagu belan blankan barbon, kiu sur la malhela fono de l'vizaĝo brilas disjetante kvazaŭ fajrerojn similajn je moneretoj arĝentaj, belegajn juveletojn eterne tintadantajn sur neriproĉinda veŝto, kaj vi tiam vidos Boulard, la faman Boulard, la plej gravan fabrikiston de kandeloj kaj la plej apetit-plenan *pastromanĝanton* en la tuta urbo.

* * *

Goethe diris : « Kvar aferojn mi malamegas egale tabakon, sonorilegojn, cimojn kaj la kristanisman ».

Por Boulard, tabako kaj sonorilegoj estis akcepteblaj ; ankaŭ cimoj, pro tio ke li kutimis kun ili en la fundbutiko de mortinta Fraŭlino Boulard. Sed la kristanismo !... ha ! la kristanismo !... ĝi estis lia « nigra besto », lia abomenindaĵo !

Pri ĝi li revadis dum la nokto kun bruado de katenoj kaj ĝemoj inkviziciaj ; kaj ĉiutage, por iri en sian fabrikon, li laŭiris longan turnvojon, tra la strato de l'stacidomo, nur por ne pasi antaŭ la preĝejo, tiu naŭziga produktaĵo de l'pra-jarcentoj, kiu kaŭzis al li singultojn de indigneco sentatajn ĝis la horo de l'tagmanĝo.

Cetere, tuj de lia kandela instaligo en Trépigny, li estis firme stariginta sian reputacion « La pastro ! li ĉie kriegis, mi sidiĝas sur lin !... » Kaj ĉar je tiu epoko li jam pezis cent naŭdek funtojn, konjektu, kiel la alveno de tia paroĥano ĝojigis la tiean pastron !

Li tamen estis bonega pastro, filo de kamparanoj ; lia karaktero estis tre dolĉa, sed ankaŭ tre energia.

Informite de la maljuna notario, kaj samtempe de la kastelmastro, pri la ŝatinda donaco ĵus sendita de la ĉefurbo, li nur momente malkvietiĝis, kaj atendis la okazontaĵojn.

La unuan fojon, kiam ili renkontiĝis, tio okazis en la mallarĝa kavvoĵeto kondukanta al la Liepvrette, ĉarma rivereto meritanta tiun solan riproĉon, ke ĝi liveras motoran forton al Boulard.

Ĝuste, tiun vesperon, Boulard estis en humoro kolerega, li estis ĵus inspektinta sian kluzon, kaj konstatinta, ke oni forŝtelis kvin aŭ ses kluzfermilojn.

La pastro serioze salutis, sed vidante la miregitan vizaĝon de l'maljuna kanajlo, li devis fari netakseblajn penadojn, por kaŝi iometan rideton, kiu nepre obstinadis levi la angulojn de liaj lipoj.

Cetere, la vera veraĵo estas, ke Boulard estis sufokiĝanta, ke li estas salutita. Kian senĝenecon li havas, tiu pastraĉo !... Tial li ne lasis longa' empe ŝimiĝadi sian impreson :

« Nu, do, Sinjoro Pastro, (kaj kiamaniere li diris tiun vorton !), vin pagas tamen la Registaro por gardi la geknabojn en la katekismo ?

— Kaj tial... ? rediris la pastro, ne komprenante.

— Kaj tial, kiel okazas, ke ili venas malfermi mian kluzon ?,..

Kiel rezono, tio ne estis mirinda. Kaj tion li bone sentis, S^o Boulard, ĉar, ne atendinte respondon, li forrapidis kvazaŭ ventblovego kun malbona rido.

« Mil diabloj ! mirinde trafite !, ... » li murmuris, fumigante la tabulojn de l'ponto sub siaj kalkanumoj, « ... alifoje li ne resalutos, la fripono ! Kaj eĉ mi povus pligravigi la aferon, kaj ĉesigi la pagadon de lia salajro, en la venonta kunsido de l'Urba konsilistaro.... »

Kaj la monologo daŭris, malbona, interrompata de ĵuraĉoj ; kaj la birdetoj dolĉe murmurantaj sian lastan kanton de l'vespero en la brilega lumo de l'mortanta suno silentiĝis ĉe l'paso de tiu tondranta persono, kiel antaŭ besto malamega kaj danĝera.

La postan tagon, Boulard ellitiĝis en bonega humoro, sed precipe tre fiero pri sia mirinda faro de l'antaŭa tago ; kaj, enŝoviĝante en sian pantalonon, li proponis al si jam matene, la jenan problemon Kiaj estas la rimedoj uzotaj por plene incitegi pastron en tempo kiel eble plej mallonga ?...

Kun animo plena de tiaj afablaj ideoj, li sidiĝis antaŭ matenmanĝaĵo la plej alloga en la mondo.

Sur arĝenta pleto premiĝis unuj kontraŭ aliaj poto da kremo. hoteleto da ŝaŭmanta lakto, cizita pladeto plena de mielo ; kaj, en angulo, kafkruĉo helpis, kiel apogilo, al granda piramido da rostitaj pantranĉaĵoj orkoloraj, kies ŝajno estis mirinde alloga.

« Nu ! metu tion-ĉi tien, Marnjo ! Bone, bone ! Mi estas certa, ke pli ol unu en la *Père-Lachaise* (1) dezirus havi tian samon. »

Kaj la servistino, juna senhonta servistinaĉo el Parizo, eksplodis en rido. Ŝia nomo estis Margarito ; sed Boulard akceptis nur la du-silabajn nomojn, kaj Margarito estis fariĝinta Marnjo kio cetere ŝin ĝenis tre malmulte.

Subite, en la momento, kiam ŝi alportis la buteron, ŝi eklaŭtigis surprizan krion : « La pastro !..... »

Oni povus ekkrii : « Brulas ! », Boulard ne eksaltus pli rapide. Kun buŝtuko en mano, li stariĝis, subite ruĝa : « La pastro ne eble !..... »

Sed jam ne ebla estis la dubo ; embuskiĝinte post la kurtenoj, Boulard povis ĉion observi : kaj, ankoraŭ maĉante, li rigarde sekvis kun mirego ĉiun paŝon de l'pastro al sia besthejmo.

Oni vidis lin, kun breviero sub la brako, levantan tre trankvile la malgrandan feran anson (2) de la dua ĝardeno ; poste, ne rapidante, li pasis sub la siringoĵoj jam senfloriĝintaj, interese ekrigardis la ruĝajn fiŝojn, kaj supreniris la unuan ŝtupon de l'ŝtuparo.

De tiam la markezo el malglata vitro malhelpis sekvi lin.

« La pastro !... pastro ĉe min !....., » murmuris Boulard, ne komprenante, duon-sufokite.

— Ĉu do, via Moŝto, mi devas lin akcepti ?

— Lin akcepti ! lin ? .., nenian !.... vi aŭdas Marnjo.., neniam !,.. Dankon ! sutanulo ĉe min !,.., »

Kaj la servistineto foriris tute feliĉa, ke ŝi tuj forpelos kompatindan pastron.

Ŝi akceptis lin tute rekta, malŝatplena, tiu senhontulino, sur la sojlo de la pordo, kun moka mieno, tute preta por tuj eldiri krude al li en la vizaĝon ion bone preparitan kaj trafeman !

Sed la dialogo ne komenciĝis en la konjektita maniero ; la pastro ja ne demandis : « Ĉu Sinjoro Boulard estas hejme !... Ĉu mi povus lin viziti?... »

Ne ; li nur diris al la servistino « Bonvolu sciigi Sinjoron

(1) Pariza tombejo famekonata,

(2) Anso, speco de riglilo, france : *loquet* ; germane, *klinke*.

Boulard, ke mi venis por mendi kandelojn, kaj ke li RICEVUS PROFITON el mia vizito. »

Boulard, kvazaŭ aigluita kontraŭ la pordo, estis ĉion aŭdinta; kaj la servistino trovis lin ŝanceliĝantan.

« Sutanulo, vere... li diris, sed la monkaso... la sankta mono... la dia kvinfranka monero!... »

Dafoje li rondiris en la ĉambro, kvazaŭ pripensante, kaj subite al la servistino :

« Enirigu lin en la skriboĉambron, kaj donu al li... seĝon,... la plej malpuran ! »

Por sin venĝi pri tiu cedo, li denove ekmanĝis kiel eble plej malrapide, daŭrigadante la tempon, enigante buteron en ĉiuuj truetojn de sia panpeco, ĝue glutetante sian kafon, legante sian ĵurnalon ĝis la lasta anonco.

Post duonhoro, li tamen devis fini la manĝadon.

Tiam, kuŝigita sur la lipoj, kun flanela jaketo malbutonumita, kun ambaŭ manoj en poŝoj kaj la dikaj fingroj ekstere, kun mieno malŝate indiferenta, Boulard puŝe malfermis la pordon post kiu la pastro verŝajne atendas ekscitita kaj timplena.

Abomenindaĵo ! la « sutanulo », instaliginte en brakseĝegon — en la plej komfortan brakseĝegon — trankvile legas sian brevieron !

« Nu, kandelojn vi deziras ?

— Jes, Sinjoro Boulard.

— Kiom da miloj ?

— Ho ! ne tiom !

— Ne tiom ! Sed mi ne estas spicisto, mi !... mi ne vendas pofunte!..

— Mi ja scias; sed kvankam ne spicisto, vi eble povus vendi al mi dek kvin aŭ dudek kestetojn da kandeloj; kaj, ĉar nia preĝejo estas iom malriĉa, mi povas esperi, ĉu ne vere Sinjoro Boulard, ke vi faros por mi malgrandan rabaton ? »

Ĉe tiuj vortoj, la maljuna Frato « tripunkta » sentis sin venkonta.

« Ha ! Ha ! ! — li eksplodis, kun la dikaj fingroj enŝovitaj en la posta bukendo de sia veŝto, — rabaton!.., kaj... por la preĝejo !... ne...,,... vere tro ridinde !... » kaj ironia rido, malbona

rikano skuadis lian ventregon ; kaj sur tiu grandega rondaĵo malŝate tintetadis la juveletoj...

« Nu, li diris, kun cigaro inter fingroj, kiam, antaŭ momento, mi vidis vin enirantan ĉe min, mi bone konjektis, ke vi venas por almozpeti iamaniere. Vi ne kuraĝis prezenti al mi la manon tute simple, kiel ordinara almozulo ; tial vi ĝin prezentis post la dorso... kiel Loyola ! Nu, tre klara estas tio, kion mi tuj diros, klara kiel akvo de la Liepvrette :

Mi estas framasono, filo post patro !

— Filo post patro ? interrompis la pastro ridetante.

— Jes, Sinjoro, kaj, kiel rabato, Eklezio ricevos de mi nur bataladon ; se mi povus vendi al ĝi miajn kandelojn por tiom da oro, kiom ili pezas, mi tion farus ; kaj mi sopiras al la baldaŭa tago, kiam ĝi ne posedos eĉ unu monereton por aĉeti kandelojn, ĉar la mallumo, en kiu ĝi tiam naĝados, estos nur figuraĵo de l'mallumeco, kiun ĝi disvastigis en la tuta mondo dum pli ol dudek jarcentoj !,..

— Ĉu finita ? diris la pastro dum Boulard spiregis.

La alia lin rigardis kvazaŭ dironte : Ĉu do vi trovas, ke tio ne sufiĉas ?

« Jes » li fine respondis ĉiaokaze.

— Nu ! Sinjoro Boulard, mi havas la honoron vin saluti. »

Kaj tre serioze, la bona pastro prenis sian brevieron kaj ĉape-lon, pasis antaŭ Marnjo tute surprizita, kaj foriris, lasante Sinjoron Boulard eksterordinare kontentan pri li mem.

(Kun permeso de l'aŭtoro, tradukis P. C.).

(Sekvo venos.)

PAĜO de la GELEGANTOJ de E. K.

Ni plezurege enpresos en E. K. paĝon de niaj gelegantoj. Ĉiuj povos sub tiu rubriko fari demandojn pri kio ajn ili deziras ; oni publikigos ankaŭ ĉion pri ajn ludoj, amuzaĵoj, humorajoj..... Hodiaŭ ni publikigas tiun demandon de F-ino M. L. « *Kian agrablan arton, junulino devas preferi ?* » Jen interesa demando ! Serĉu, Fraŭlinoj, kaj ne timu sendi vian respondon al E. K. sur simpla (aŭ ilustrita) poŝtkarto.

LA LASTA ABENCERAĜO

DE CHATEAUBRIAND (*Sekco*)

Dona Blanka estis idino de familio, kiu mem devenis de l' Cidi de Bivar' kaj de Kimen, filino de grafo Gomez de Gormas.

La idaro de l venkisto de Valenco la Bela iĝis ekstreme malriĉa pro la sendankeco de l' Kastilia kortego ; eĉ oni kredis, dum multaj jarcentoj, ke ĝi ĉesis ekzisti, tiel malglora ĝi fariĝis. Sed kiam Grenad' estis venkita, unu lasta ido de l' Bivar' a raso, prapatro de Blanka, estis rekonita malpli pro siaj nobelaj titoloj ol pro la grandeco de sia valoro. Post la elpelo de l' mal-fideluloj, Ferdinand'o donis al la Cidido la bienojn de multaj maŭraj familioj kaj kreis lin duko de Santa-Fe. La nova duko elektis sian loĝejon en Grenad', kaj mortis ankoraŭ juna, lasante unikan filon jam edziĝintan : don Rodrig', patro de Blanka.

Dona Tereza de Kheres, edzino de don Rodrig, naskis filon, kiu ricevis je sia naskiĝo la nomon de Rodrig', kiel ĉiuj liaj praavoj, sed kiun oni nomis « don Karlos » por lin distingi de sia patro.

« La gravaj fariĝoj kiujn Don Karlos vidis de sia plej frua juneco, la danĝeroj kiuj lin minacis preskaŭ tuj post sia eliro el l' infaneco, nur igis pli grava kaj pli rigida karakteron nature severmoreman.

Don Karlos apenaŭ estis dekkvarjara kiam li sekvis Kortez'on al Meksiklando : li suferis ĉiujn danĝerojn li estis vidinta ĉiujn terurojn de tiu aventuro miriga ; li ĉeestis la falon de l' lasta reĝo de mondo ĝis tiam nekonata.

Tri jaroj post tiu katastrofo, Don Karlos troviĝis en Eŭropo al la Pavia batalado, kvazaŭ por vidi la honoron kaj valoron kronitajn perej sub la batoj de l' sorto.

La vidiĝo de nova universo, longaj vojaĝoj sur maroj ne ankoraŭ trairitaj, la spektaklo de l' revolucioj kaj malkvietaĵoj de l' sorto, fortege ŝancelis la religian kaj melankolian spiriton de Don Karlos ; li estis kavaliro en l' ordeno Kalatrava kaj for-lasante la edziĝon, malgraŭ la petoj de Don Rodrig' li decidis doni ĉiujn liajn bienojn al sia fratino.

Blanka de Bivar, sola fratino de don Karlos kaj multe pli juna ol li, estis la idolo de sia patro ; ŝi perdis ŝian patrinon kaj ŝi estis preskaŭ dekokjara kiam Aben-Hamet alvenis en Grenad'.

Ĉio estis ĉarmeco en tiu ensorcĉema virino ; ŝia voĉo estis rava, ŝia danco pli malpeza ol la venteto ; jen ŝi ŝatis gvidi ĉaron, kiel Armido, jen ŝi « flugadis » sur la dorso de l'plej rapida Andaluzia ĉevalo, kiel tiuj ĉarmaj feinoj kiuj aperis a¹ Tristan'o kaj Galaor'o en arbaroj.

Ateno estis konfuzita ŝin kun Aspazi'o, kaj Paris'o kun Dian'o de Poitiers (1), kiu ekbrilis ĉe la Kortego. Sed kun la ĉarmoj de francino ŝi posedis pasiojn de hispanino ; kaj ŝia natura koketeco forprenis nenion el la fideleco, konstanteco, forteco alteco de l'sentoj de sia koro.

Pro la krioj, kiujn laŭtigis la junaj hispaninoj kiam Aben-Hamet antaŭensaltis en la arbetaron, don Rodrig alkuris.

— Mia patro, diris Blanka, jen estas la maŭra sinjoro, pri kiu mi parolis al vi. Li min aŭdis kanti, li min rekonis, li eniris en la ĝardenon por min danki, tial ke mi montris al li sian vojon...

La duko de Santa-Fe akceptis l'Abenceraĝon kun la ĝentileco serioza kaj tamen naiva de la Hispanoj. Oni rimarkas ĉe tiu nacio nenian el tiuj servutaj sintenadoj, el tiuj frazarangoj, kiuj anoncas la malnoblecon de l'pensoj kaj la humilegecon de l'animo. La lingvaĵo de ĉefnobelo kaj de kamparano estas la sama ; la saluto, simila ; la komplimentoj, kutimoj, moroj, estas samaj. Kiom senlimaj estas la konfido kaj grandanimo de tiu popolo al la fremduloj, tiom terura estas ĝia venĝo, kiam oni ĝin perfidas.

Heroe kuraĝa, senlaciĝe pacienca, nekapabla cedi, ĝi devas venki la malbonan ŝancon aŭ esti subpremata de ĝi. Tiu popolo havas malmulte da tio, kion oni nomas spriteco ; sed la tro-grandigitaj pasioj anstantaŭas por ĝi tiun lumon, kiu venas de la delikateco kaj sufiĉego de la ideoj.

Hispano, kiu pasigas la tagojn ne parolante, kiu nenion vidis, nek deziris vidi ion, kiu nenion legis, studis, komparis, — trovos en la graveco de siaj decidoj la necesajn rimedojn, en la momento de malprospero.

Estis la tago en kiu naskiĝis don Rodrig', kaj Blanka donis por sia patro « *Tertullia'n* » (t. e. festeto) en tiu ĉarma solejo.

¹ Elparolu Pŭatje.

La duko de Santa-Fe invitis Aben-Hamet'on sidiĝi inter la junulinoj, kiuj amuziĝis pro la turbano kaj robo de l'fremdulo.

Oni alportis velurajn kusenojn, kaj l'Abenceraĝo kuŝiĝis sur ĉi tiujn kusenojn laŭmaniere de l'Maŭroj.

Oni demandis lin pri lia lando kaj liaj aventuroj pri tio li sprite kaj ĝoje respondis.

Li parolis la plej korektan Kastilian lingvon; oni estus kredinta, ke li estas Hispano, se li ne estus preskaŭ ĉiam dirinta *ci* anstataŭ *vi*. Tiu vorto, en lia buŝo, estis tiel dolĉa, ke

Blanka ne povis sin defendi kontraŭ sekreta kolereto, kiam li parolis al unu el ŝiaj kunulinoj.

Multaj servistoj ekvidiĝis: ili portis la ĉokoladon, la fruktajn kukojn kaj la sukerajn konusetojn de Malaga, blankajn kiel la neĝo, porajn kaj malpezajn kiel spongoj.

Post la *refresco* oni petis ke Blanka dancu unu el tiuj karakterizaj dancoj, en kiuj ŝi superis la plej lertajn ciganinojn.

Ŝi devis cedi pro la deziroj de siaj amikinoj. Aben-Hamet silentis; sed siaj petegantaj rigardoj parolis anstataŭ sia buŝo. Blanka elektis « *sambra'on* », espriman dancon, kiun la Hispano prunte prenis de l'Maŭroj.

Unu el la junulinoj ekludas per gitaro la arion de l'fremda danco. La filino de don Rodrig malmetas sian vualon kaj alligas al siaj blankaj manoj kastagnetojn (1).

Ŝiaj nigraj haroj dispendas bukale sur ŝia kolo alabastro-simila; ŝia buŝo kaj okuloj kune ridetas, ŝia vizaĝo koloriĝas pro la movo de ŝia koro.

Subite ŝi eksonas la bruon ebonon, frapas tri fojojn laŭtakte, ekkantas de l'*sambra* la kanton, kaj, unuigante sian voĉon kun la sono de l'gitaro, tiel rapida kiel fulmo, ŝi ekdancas.

Kia diverseco en ŝiaj paŝoj! kia eleganteco en ŝiaj sintenadoj! Jen ŝi levas vivece siajn brakojn, jen ŝi lasas ilin refali molece. Kelkafoje ŝi antaŭensaltas ŝajne ebriigata de plezuro kaj foriĝas kvazaŭ subpremata de malĝojo. Ŝi turnas la kapon, ŝajnas voki iun nevideblan, prezentas modeste ruĝegan vangon

1 Frapiloj ebonlignaj.

al kiso de nova edzo, forkuras hontema, revenas radia kaj konsolita, marŝas laŭ majesta kaj preskaŭ milita paŝado, kaj ree flirtas sur la herbaro.

La harmonio de ŝiaj paŝoj, kantoj, kaj de l'sonoj de ŝia gitaro, estis perfekta. La voĉo de Blanka, iom kvazaŭ vualita, havis tiun specon de akcento, kiu movigas la pasiojn ĝis la fundo de l'animo.

La muziko Hispana, konsistanta el sopiroj, rapidaj movoj, malĝojaj rekatanĵoj, kantoj subite interrompataj, prezentas strangan miksaĵon de gajeco kaj melankolio. Tiu ĉi muziko kaj danco fiksis por ĉiam la sorton de l'lasta Abenceraĝo : ili estis sufiĉaj por konfuzi koron malpli malsanan ol lia.

Vespere oni revenis Grenad'on tra la valo de l'Duro. Don Rodrig' ĉarmita de l'manieroj noblaj kaj ĝentilaj de Aben-Hamet, ne volis disiri de li, ĝis kiam li promesis ofte veni por amuzi Blankan per la mirindaj rakontoj Orientaj.

La Maŭro, feliĉega pro la efektiviĝo de siaj deziroj, akceptis la inviton de l'duko de Santa-Fe, kaj tuj la morgaŭan tagon li iris al la palaco, kie spiris tiu, kiun li amis pli ol la lumo de l'tago.

Blanka baldaŭ troviĝis allogata en profunda pasio, tial ja ke ŝi kredis tiun pasion nesentebla de ŝi.

Ami nekristanon, Maŭron, nekonatulon, ŝajnis al ŝi afero tiel stranga, ke ŝi neniel sin gardis kontraŭ la malbono, kiu ekpenetris en siajn vejnojn ; sed tuj kiam ŝi rekonis ĝiajn atakojn, ŝi akceptis ĉi tiun malbonon laŭ vera Hispanino.

La danĝeroj kaj ĉagrenoj, kiujn ŝi antaŭvidis, ne igis ŝin returnen iri for de la bordo de l'profundegaĵo, nek longe konsiliĝi kun sia koro. Ŝi diris al si « Aben-Hamet estu kristana, li min amu, kaj mi sekvos lin ĝis l'ekstremaĵo de l'tero ».

L'Abenceraĝo sentis ankaŭ la tutan povon de pasio nevenkebla, li vivis nur por Blanka. Li ne plu okupiĝis pri la projektoj, pro kiuj li venis al Grenad' facile li povis ricevi la informojn, kiujn li venis serĉi; sed ĉiu alia intereso, krom tiu de amo lia, forestis de lia animo.

Li eĉ timis klarigojn, kiuj povus okazigi ŝanĝojn en sia vivo. Li demandis nenion, li volis nenion koni; li diris al ŝi « Estu Blanka musulmanina, ŝi min amu, kaj ŝin mi servos ĝis mia lasta sopiro ».

Aben-Hamet kaj Blanka tiele fiksitaj en sia decidaĵo, atendis nur okazon por esprimi reciproke siajn sentojn.

Estis tiam la plej belaj tagoj de l'jaro.

— Vi ne ankoraŭ vidis l'Alhambra'on, diris la filino de l'duko de Santa-Fe al l'Abenceraĝo. Se mi kredas laŭ keltaj vortoj, kiujn nevole vi elparolis, via familio devenas de Grenad'. Eble vi estos kontenta vizitante la palacon de viaj iamaj reĝoj. Al vi, hodiaŭ vespere, mi volas mem servi kiel gvidanto.

Aben-Hamet ĵuris per la profeto ke nenia promeno povus esti al li pli agrabla.

Alveninta la horo fiksita por la pilgrimo al l'Alhambra, la filino de don Rodig' rajdis sur blankan ĉevalinon, kiu kutimis suprenrampi kiel kapreolo ŝtonegojn.

Aben-Hamet akompanis la brilan Hispaninon sur andaluza ĉevalo, ornamita laŭmaniere de l'Turkoj. Pro la rapida kuro de l'juna Maŭro, lia purpura robo ŝvelis malantaŭ li, kurbglavo lia sonis sur l'alta selo, kaj la vento tremetigis la plumfaskon, kiu superis lian turbanon.

La popolo, ĉarmita pro lia bela sintenado, diris rigardante lin pasantan :

« Li estas princo nekristana, kiun dona Blanka baldaŭ konvertos.

Unue ili sekvis longan straton, ankoraŭ nomatan laŭ la nomo de fama maŭra familio; tiu strato finiĝis ĉe la murzono ekstera de l'Alhambra. Poste ili tra iris ulman arbaron, alvenis apud fontano, kaj baldaŭ troviĝis antaŭ la murzona interna de l'Boabdil'a palaco. En murego fortikigita per turoj kaj superigita per ŝtondentaro malfermiĝis pordo, nomata la *Pordo de l'juĝo*. Ili transiris tiun ĉi unuan pordon, kaj antaŭeniris en mallarĝan vojon, kiu zigzagis inter altaj muroj kaj loĝejaĉoj duone ruiniĝitaj.

Tiu ĉi vojo kondukis ilin ĝis la placo de l'Algibes'oj, apud kiu Karlo-Kvina estis tiam konstruiganta palacon. De tie, direktiĝinte norden, ili haltis en kortosenhoma, malsupre de muro senornama kaj difektiĝita pro la tempo. Aben-Hamet malpeze saltis teren, prezentis la manon al Blanka por ke ŝi malsupreniru de sia mulino.

La servistoj frapis kontraŭ forlasita pordo, kies sojlon la herbo kaŝis la pordo malfermiĝis, kaj subite vidigis la sekretajn rifuĝejon de l'Alhambra.

Ĉiuj ĉarmoj, ĉiuj patrolandaj bedaŭroj, miksitaj kun la allogoj de l'amo, ekkaptis la koron de l'lasta Abenceraĝo.

Muta kaj senmova, li penetrigis mirajn rigardojn en tiun ĉi loĝejon de l'Spritoj ; li kredis sin transportita ĉe la eniro de unu el tiuj palacoj, kies priskribon oni legas en Arabaj rakontoj. Malmasivaj galerioj, blankmarmoraj kanaloj borderitaj per oranĝarboj florplenaj, fontanoj, solecaj kortoj ĉie montriĝis antaŭ la okuloj de Aben-Hamet ; kaj tra la longigitaj arkajoj de la galerioj li ekvidis aliajn labirintojn kaj novajn ensorĉaĵojn.

La lazuro de l'plej bela ĉielo vidiĝis inter la kolonoj, kiuj subtenis gotan arkafaron. La muroj, kovritaj per Arabaj skulptaĵoj, ŝajnis por la okuloj tiujn ŝtofojn de Oriento, broditajn, dum la enuo en la haremo, laŭ la kaprico de sklavulino.

Io volupta, religia, kaj milita ŝajne spiriĝis en tiu ĉi magia konstruaĵo, kvazaŭ galerio de l'amo, mistera rifuĝejo kie la reĝoj maŭraj ĝuis ĉiujn plezurojn kaj forgesis ĉiujn devojn de l'vivo.

Post kelkaj miraj kaj silentaj momentoj, la du amantoj eniris en tiun loĝadon de l'pasinta potenco kaj iamaj feliĉaĵoj. Unue ili rondiris ĉirkaŭ la ĉambron de l'Mesukar'oj, meze de l'floraj parfumoj kaj de l'malvarmeteco de l'akvoj. Poste ili penetris en la korton de l'Leonoj. La kortuŝeo de Aben-Hamet pligrandiĝis je ĉiu paŝo.

(*Sekvo venos*) Tradukis : ELEDA kaj VINKO.

EN ESPERANTUJO

REVUO DE LA REVUOJ ESPERANTISTAJ.

Lingvo internacia. — (I-a apr.) — La esenco de la ekzisto, J. Oĥoroviĉ ; « Rigardu, jen el malgrandetaj brikoj stariĝas konstruaĵo de la scienco, malproksime de vanaj demandoj. La konstruaĵo estas nuda kaj modesta, sed forta ; kaj la tempo ĝin ne detruos, kiel estas detruitaj tiuj luksaj palacoj, kiujn vi miris dum via vojaĝo. » Tiu filozofia legendo estas trad. de H. Hejn. — La sep mortpekoj (S. Largerlof, esp. Paul Nylén). — Nekomprenito, de Ajnulo. — Miksaĵoj. — Pri la karbonmineja

Societo en Courrières, de F. A. — Ald. Liter : Rememoro pri Solferino. — Tra la mondo esperantista. —

15-a apr). — Antaŭhistoria gramatikisto, (R.-J. Lloyd) « Niaj Ariaj praavoj havis neniun alfabeton. Ne ekzistas sola vorto aŭ litero de la Aria lingvo en la tuta mondo. Se ili havis alfabeton, ili estus lasintaj al ni sendube, vortojn skribitajn sur ŝtono; sed tiaj ŝtonoj tute ne ekzistas. » — La serpento, de J. Bois, trad. M. Finot. — Sesamo malfermiĝu (S ino Edgren), trad. Sam. Meyer. — Terkultura kalendaro, de P. Champion. — Hispanaj proverboj, de Ricardo Codorniu. — Tra la mondo esper. — Ald. Liter : Rememoro pri Solferino.

Espero Pacifista (Marto). — Utileco de la militistaj elspezoj, (F-ino Royer) :

« Tiuj elspezoj, kiom ajn kostaj ili estas, ne povas konsuminacion, ĉar la mono restas en la lando; ĝin profitas multe da industrioj drapaj, piedvestaj, jungilaj fabrikoj, ktp., kaj ankaŭ la ĉevala, mula produktado kaj arnila komercado. — Do forlasu esprimi tiun ideon, ke la milita buĝeto nin ruinigas. » — Pacifismo antaŭ la ekonomia scienco, (S-ino Servin). Alvoko al la civilizitaj nacioj pri la situacio en Rusujo. — La Societo. — Miksaĵoj. — Arbitracio internacia. — Pacifisma movado. — Internaciismo. — Esperanta movado. — Notoj. —

Tra la mondo, (apr.). — La morteliĝintoj de Courrières; rakontita de ministro *Nény*. « Dum tagoj oni engratadis la teron per siaj ungoj por transiri rubaĵojn sur kiuj estis malvivuloj. Ifoje oni opiniis trafi la celon; kaj staris bariloj, kiuj malhelpis pasi kaj devigis malantaŭeniri. Tamen mi ne malesperis. Eĉ mi diris iun tagon al miaj kunuloj: « *Kiam oni estos récappe* (savitaj), *oni fotografos sin kune* ». Se mi estus malesperinta, mi estus certe mortinta. Tamen ni estis malsataj. Foje oni trovis senvivan ĉevalon; ĉiujn oni sin alĵetis kaj oni ĝin dispecigis. Ni da ĝi manĝis kaj metis pecojn enniajn poŝojn. oni enesploris la mortintajn kamaradojn kaj deprenis la panon enhavitan en iliaj sako, kaj oni ĝin manĝis, kaj ankaŭ oni trovis akvon fluantan laŭ galerio, oni ĝin trinkis ». — Principoj de decimala klasigo; fino de la lerta studado de G. Chavet. — Centjarfesto de Reĝolando en Bavarujo. (Zacherl Charles). —

Milito kaj paco, de S. Meyer. — La « Jiu-Jitsu » de M. Finot. — Pri Esperanto. — La ekspozicio de Milano. — La vivado de Teoplantisto en Hindujo (Alf. Simper). — Enŝipigo de Elmi-grantoj en la Havre, (E. Lagoffre). — Enketo pri edukado. — Pri Homaranismo. — Jaroslav Kocian. — La torento el Ŝaŭmo (de Daniel Lesuer) esp. J. Flourens.

L'Esperantiste, (apr.). — Introdukcio de Esperanto ĉe la francaj Akademioj : Jen la projekta leĝo proponita de la deputatoj : « De la 1907-1908-a lerneja jaro, la lernado de la Lingvo internacia *Esperanto* estos enirita en ĉiuj programoj de l'publika instruado, kiuj enhavas la lernadon de la vivaj lingvoj ». — Al multaj, al ĉiuj (L. de Beaufront). — Kroniko franca kaj esperanta. — Pri la II-a Kongreso. — Kannitversta, de Hebel, trad. H. Boucon. — Tapeto, de Ed. Marcelé. — Frazologio. — Intern. koresp. Esper. —

Ruslanda Esperantisto, (apr.). — Elementoj de kunfratigo de popoloj, de A. Saĥarov. — El la mondo homarana. — Pri « Unuiĝo de Kristanaro », de A. Dombrovski. — Maj'Printempo venas (Fez). — La Pariza Sorbono, de G. Kolowrat. Fji... fji... fji... (Fez). — Esperantista movado. — Ruĝa rido, de L. Andrevjev. (Ni hodiaŭ publikigas la « leteron malkovritan » de P-ro Dombrovski al S-o P-ro Em. Peltier.)

La Belga Sonorilo, (apr.), — Arboj, niaj amikoj, de J. Jamin : »

« Arbo estas certe la plej bela, la plej plena kreaĵo de la naturo, kaj honorigi la arbojn estas honorigi la tutan kreitaron, estas festi amikojn kiuj zorgas pri nia saneco, nia sendanĝereco, nia okulplezuro kaj ĉiuj bezonoj niaj.

« La arbo ricevas la brulantajn radiojn de la suno. Al ĉiuj ĝi donas la favoran ombron. Ĝi suferas venton kaj pluvon. Al ĉiuj ĝi certigas zorgantan rifuĝejon.

« Ĝi ensorbas la pereigan karbonon. Sed ĝi elspiras la oksigenon kiu nutras.

« Kiam oni donas al ĝi malpuraĵojn kiel nutraĵon, ĝi respondas per floroj.

« Kiam oni ĵetas al ĝi ŝtonojn, ĝi donas fruktojn ».

Korvo kaj vulpo, de A. Grabovskij. -- Al komercistaro. — Pri Hilelismo. — Mozart, (D-ro) M. S.). — Diversaĵoj. —

Franca-flandra fako. — L'Esperanto eksterlande. — Belga kroniko. — Komunikaĵoj. — Amuzajoj. --

The British esperantist, (apr.). — Pri la influo de la muziko, de A. J. Hulme « Ec en la batalado, la buĉado, la muziko estas trempata, ĉar (krom la arto vidata sur uniformoj kaj flagaro) en ĝi konsistas preskaŭ la tuta gloro de la militado. Nuntempe oni malofte aŭdas pri ĝia uzado de la batalado ĉe Eŭropanoj kvankam antaŭ ne longe oni aŭdis ke la sakfajfiloj ankoraŭ ekscitegas, la Skotojn dum la batalado ĝuste kiel tiu muzikilo, en la antikvaj tempoj, instigis la Skotajn montanojn alvokatajn al batalo. »

Pri Achille Motteau: Kolonelo Pollen. — Esper.Org. Komitato. — Kroniko. — Gazetaro, — Ald. Liter. Londona « Couty Council » ĉe la grupo esperantista Pariza. — Ĉielo kaj tero, de H. Lambert, — Kalifornia juĝisto, (J.-C. Rust.). — Du neoj faras jeson. — Dogmoj de Hilelismo. — Mia onklo Tobio kaj la muŝo. — Eppan en Tirolo. (R. Aŭerbach). — La societo de kristanaj klopodantoj. — La genio de Abelard.

Germana Esperantisto. (apr.), — Festotago de la esperantistoj »

« Nia fervora amiko kaj kunbatalanto Prof. Otto Simon en Ung Hradisch deziras, ke oni elektu unu tagon kiel oficialan festotagon de la tutmonda esperantistaro. Li opinias, ke tia festotago estus utila kaj bonfara, kuragigus la batalantojn, plifortigus la energiojn kaj starigus pli fortan kunligon inter la diversnaciaj samideanoj. Li pensas ke oni povus elekti kiel daton por tiu ĉi festo la naskiĝan tagon de nia kara Majstro Dro Zamenhof, la 15-an de Decembro, kaj deziras ke la tuta afero estu preparolata en la proksima Ĝeneva kongreso »

Esperanto, de W. Ostwald kaj Couturat. — El germanlingvaj landoj. — Pri la kunveno en Braŭnschweig. — Pri la kongreso II-a.

Suno Hispana, (apr.). — « Al niaj kunlaborantoj »

« Ni ĝoje akceptas kaj akceptos la kunlaboradon de niaj legantoj, sed estas dezirinde ke tiu helpo ne malfaciligu la pretigadon de la gazeto nek forŝtelu nian tempon ».

Popolaj rakontoj. — Sciigoj. — Miksaĵoj. — Bibliografio. — Estas strange, de R. Ayza.

Esperanto, (marto aprilo). — La statuo de sankta Gerardo. Polemia. — La hejmo de l'poeto (J. Arany). — Mia fonta plumo, de M. Wescott. — La sunforto. — Valoro de fianĉino (L. E. Sepulveda Cuadra). — Ha! Kia publiko, de A. Ĝeĥov. — Kroniko.

Unua paŝo, (marto). — Panslavisma lingvo, (H. T. Rjahovski). — Malbenita tago (de l'sama). — La pasinta kaj estonta aktiveco de la Makedonia-Odrina organizaĵo. — La tapiŝo. — La kristaniĝo de l'Bulgaroj, de Ento. — Enuo, de G. Nikolov. — Kroniko.

La revue de l'Esperanto, (aprilo). — Esperanto kaj kutimoj. — Forigo de la supersignoj. (D-ro Javal). — Ankoraŭ pri Hamleto, de Grafo. — Karnavalaj kutimoj.

Alĝeria stelo, (apr.). — Enketo pri Virinoj. — Pri Esper^o Kataluna. — Soldato, (fino). — Virina ruzo (de A. Bezingé). — Diversaĵoj. — La bestoj antaŭ Jupitero. — Songo de Esperantisto, de Alceste. — Vojaĝo en Okcidentafrikaj bordoj de Grafo A. Gallois.

Lorena Esperantista Ĵurnalo, (apr.). — Pri ĝia vivo kaj pri l'alveno de S-ro Th. Cart en Nancy.

DUA KONGRESO UNIVERSALA

DUA CIRKULERO DE LA LOKA ORGANIZA KOMITATO

ALVOKO : La Komitato petas, ke oni bonvolu mendi, kunsendante la monon, la kartojn kiel eble plej baldaŭ, por ke oni povu kalkuli la nombron de la kongresanoj.

LOGADO : La Kongresanoj, kiuj volas esti certaj pri konvena leĝado devas de nun LUI ĈAMBRON. La Komitato zorgos pri tio kaj havigos loĝejon al la kongresanoj kiuj sciigos la datojn de sia alveno kaj foriro, kaj sendos al ni almenaŭ tri frankojn por ĉiu nokto. Specialajn dezirojn oni penos plenumi. — Tiuj kiuj pagos 4 fr havos kompreneble proporcian ĉambron. Tiuj, kiuj pagos 5, 6, fr aŭ pli havos proporcian ĉambron en

hotelo. — La Grupoj aŭ Lernantaroj kiuj dezirus loĝi en komunaj dormejoj (kompreneble je tre malkara prezo) devas sendi oficialan demandan leteron kun precizaj detaloj al la Loka Komitato, kiu donos al ili ĉiujn necesajn sciigojn.

MANĜADO : Por certigi la Kongresanojn pri preciza kosto de manĝoj, la Komitato publikigos nomaron de ĝenevaj restoracioj kiuj promesis doni tagmanĝon (kun trinkaĵo) po 2 frankoj, kaj vespermanĝon (kun trinkaĵo) po 3 frankoj. — Krom tio, la Komitato sciigas ke en Ĝenevo ekzistas grandaj Popola restoracioj, kie oni povas havi simplan, sed bonan manĝon por 0 fr. 60.

TEATRA VESPERO, (29 aŭg.). Ĉiuj grupoj aŭ izolaj esperantistoj kiuj intencus ion kanti, deklami aŭ ludi bonvolu de nun sin enskribigi kaj sendi al ni la tekston de la verkoj, kiujn ili intencus prezenti. — **BALO** (31 aŭg.). La Komitato petas ke multaj Kongresanoj alportu *naciajn kostumojn* por tiu balo.

Kongresaj Markoj Oni de nun povas aĉeti, por glui sur leteroj aŭ poŝtkartoj, la oficialan markon de la Kongreso kunjarta ilustraĵo. Prezo : 100 markoj, fr 1,50 ; 500 markoj, fr 5.

« Aliĝojn, monon, korespondaĵojn, ktp., unuvorte ĉion, kio « koncernas la kongreson, oni sendu nur al *Kongresa Oficejo* « 15, quai de l'Île, Genève, (Suisse). »

NOTETOJ.

Esperanta Ligilo — (3 fr.) — Rev. por blinduloj. Dir. Th. Cart. 12 R. Soufflot, Paris. — Enhavo Kroniketo (Fanny Ducret.) — Interparolado Vizito. — Problemo. — Humoraĵo. Ŝirbastonoj (Th. Cart.). — Poezio : el Heine. — Korespondado (Brown). — Miksaĵo Nombro de loĝantoj. Proverboj. Felietono : Perdita kaj retrovita, de A. Boirac.

Internacia komercista Esperanta societo « Progreso », en Frankfurt (Germ.) La grupo komerca « Progreso » per cirkuleroj sciigis, ke filio de la « I. K. E. S. » povas esti fondata en ĉiu urbo. Ĉiuj komercistoj estas petataj demandi la senpage sendotan regularon, ĉe « Progreso », Internacia Komercista Esperanta Societo, *Neue Mainzerstrasse, 59,* Frankfurt-a-M., en Germanujo.

Socia Revuo.— Per cirkulero la *Cercle Communiste*, Genève, faras alvokon al la Socialistoj kaj al la anarkistoj per la voĉoj de S-oj Richard kaj Chapelier. Ili petas ke la Socialistoj kaj anarkistoj kunigu iliajn fortojn kaj monon por fondi « Tutmonda'n Socia'n Revuo'n » S-o Verema, Genève, fine montras la celon de la estonta Revuo.

Germanlingva Esperantista Societo. — Ni sciigis kun granda plezuro la fondon de G. E. S. La ĉefa tasko de la societo estas la divastigado de Esperanto tra la komerco kaj scienco, precipe en la germanlingvaj landoj, Germanujo, Aŭstrio, kaj Svisujo. — Certe, kiel la *Societo franca* p. E. la nova societo multe progresigos nian aferon en la supre nomitaj landoj. — Prezidanto D-ro Mybs (El Altona) ; Sekretario D-ro Hanaŭer (El Frankfurt).

Nova Esperanta Signo. — La esperantista grupo de Frankfurt proponas kiel pli simpla ol la verda stelo, *pinglon kun verda emajla kapeto*.

La simpla pingla signo estas rekomendinda 1-e pro ĝia modestecco ; 2-e pro ĝia mamultekostecco ; 3-e pro ĝia ĉietro veblecco ; k. t. p. — Oni povas aĉeti centon por 45 pfenigoj, ĉe la Grupo Esp. de Frankfurt. (S-ro Barthel, sek, Wöhlerstr 14).

Universala kongreso de la « Sociétés d'activité chrétienne » (Societoj de kristana agemo). Tiu kongreso okazos en Genève samtempe kun la kongreso de Esperanto. Laŭ la cirkulero kongresa, la Societo havasanojn en diversaj nacioj ; tial oni enskribis sur la programo *kunvenon pri Esperanto* « La Societoj de K. A., oni diras, devas laboradi por rompi la bariilon, kiun la diversecco de lingvoj metas, en Eŭropo, kontraŭ la progresado de l'regno Dia kaj kontraŭ la internaciaj rilatoj de la eklezioj. — Bonege. Tio estas unu plia helpilo al la *Unuiĝo de kristanaro*.

Rondirantaj gazetoj: Alvoko al katolikaj pastroj kaj religiuloj. Sub tiu titolo ni ricevis (tro malfrue por presigo) bonegan artikolon el Belgujo. Ni ĝin publikigos en nia julia numero.

Tiuj, kiuj interesigas pri *Rondiranta gazeto* povas de nun sin turni, por ricevi klarigojn, al S-o Rondestro de « Pastra Stelaro », ĉe Pastro HONINCK, Laplante-lez-Namur, Belgujo.

Stranga Sinjoro !! — Neniam tiel multaj estis, la reformistoj, plibonigistoj de Esperanto, — la elpensistoj de novaj Internaciaj (?) lingvoj! En tiu stelaro da « *genioj* » ĝis nun ne ŝatataj, aŭ nekonataj, estas S-o D-o F. Greenwood. Antaŭ kelkaj jaroj, — li certigas! — li elpensis lingvon, kiu estas rilate al Esperanto tiel kiel estas Esperanto rilate al Volapuko: tio estas, grandega progreso, ŝatinda pliperfekto!! Li... *private publikigis* (!?)sian sistemon en la jaro 1903. Mi iom *miretis* pri la modesteco de tiu elpensisto, kiu dum du LONGAJ JAROJ lasis sian lumon sub la buŝelo! Mi *miris* pri tiu *privata publikigo*!! Mi ja *mirigis* kiam mi legis en la angla revuo « THE NURSING TIMES » de marto 1906, artikolon tre lertan de la sama Sinjoro, *Pri kaj Por Esperanto*!!! Ĉu mi bone legis. S-o Doktoro! Ĉu mi ne eraris? — Ĉu estas la sama Sinjoro, kiu samtempe bataladas por ESPERANTO en la gazetoj, kaj bataladas por ia EKSELSIORO en cirkuleroj??

Ĉu vi volas koni per kio *Ekselsioro* superas ESPERANTON? Per la forigo de la supersignitaj literoj, (c anstataŭ ĉ, x anstataŭ ŝ, (per *duobla* sono (longa aŭ mallonga, laŭ la pozicio) de vokaloj *i* kaj *u* (!), per *aldono de subjunktiva formo* (!), per *rigida rortordo* en frazoj subjekto, verbo, komplemento (!). per adjektivo *ĉiam metata antaŭ la nomo* (!), k. t. p.

Jen modelo de tiu perfektaĵo; « La ple bona lingvo estas: — la « ple breva, la ple klara kaj la ple fasila metodo kiu on « povas esprimi sia propra pensoi.... Vivado estante progresado « kaj progresado estante xanjo (ŝanĝo !!), sekvas ke la saĵulo devas alfari si al tia granda lego de Naturo (cau gi estu « lingvo au agadoj). »

Ĉu tio ne estas *ridinda karikaturo* de Esperanto ?? — Ĉu tiu Doktoro ne estas vera... *ŝercisto* ???.

Prof. E. LIME.

BIBLIOGRAFIO

Kio povas okazi se oni donacas surprize, de Fritz Reuter. — Tiu humoraja rakonteto estas el subgermana lingvo tradukita de S-o Ĉefeĉ, l'aŭtoro bonekonata de la Ŝlosiloj. La tradukinto kritikigis sian tradukon per diverslingvaj esperantistoj, kaj tiamaniere la rakonteto estas tute internacie komprenebla.

Mi pasigis plej agrablajn momentojn legante la amuzajn vojaĝojn de la « ĝirafakesto » ! Aĉetebla ĉe l'aŭtoro po 0 fr. 70, afrankite (S.-o. Ĉefec, 45, Christchurch Road, Streatham. London).

Urso. — **En Montoj**, de H. Sentis (Ĉe Presa Esperantista Societo. — 84 p.) Originale verkita de S-o Sentis, tiu libreto enhavas du partojn *Urso*, humoraja rakonto, kaj : *En Montoj*. Tiu poezia parto estas vere ĉarma. Jen kelkaj versoj pri malgranda floreto :

« Sed kial ci tiel belete floradas ?

« Kaj kial ci punton folian etendas ?

« Cin nek papilio, nek kisis abelo

« Ĉar tian altaĵon eĉ agloj ne flugas.

« Al cia kroneto,

« Malgranda floreto,

« Nenia rigardo. »

La Evangelio de S. Mateo, lau D-ro Martin Luther, trad. W. B. Mielck kaj Fr. Stephan (Prezo: 50 pfenigoj. Ĉe Esperanto Verlag, Moller et Borel, BERLIN, 66 paĝoj.)

De longa tempo ni parolis pri la traduko de l'Evangelioj. Jen ĝi estas komencita de Protestantoj. Ni nur tralegis kelkajn paĝojn de ĝi. La stilo ŝajnas bonega. — Ni intencas reparoli pri la traduko mem. Kiel diris S-o Rust, en *British Esperantist*, tia traduko devus esti farita laŭ la plej bonaj tekstoj grekaj kaj ne laŭ traduko en nacilingvo, eĉ de D-o Luther. Traduko de traduko, ne povas esti tiel fidela, kiel traduko laŭ originala teksto.

Esperanto. Objections. (Kontraŭparoloj) Broŝureto kontraŭ-esperantista de P. Chappellier. L'aŭtoro reparolas pri la centmilfoje eluzita temo

Esperanto *preskaŭ* certe forigos la naciajn lingvojn ! Ni ne bezonas respondi tiajn kontraŭparolojn jam de longe rebatitajn, eĉ antaŭ la apero de tiu ĉi broŝureto. Io notiinda la broŝuro efektive kontraŭbatalas ne nur Esperanton, sed ĉiujn estintajn kaj estontajn lingvojn internaciajn ! *Kiu tro provas, nenion pruvas !*

Un Ora d'Esperanto, de Th. Cart. P-o J. Meazzini, nia eksrajtigito en Itallando, bone faris tradukinte en italan lingvon, la interesan broŝureton de P-ro T. Cart. Ni esperas ke per tiu ĉi nova ilo de propagando, nia bona afero progresados pli kaj pli en Italujo. — Aĉetebla ĉe la tradukinto, piaz. G. Monaco 18 AREZZO — (Italujo). Kostas nur 0 fr. 50. —

Detala Raporto de la 1-a Universala kongresa en Esper. en Bulonjo. — Pastro Schneeberger, skribis li mem la stenografiajn notojn uzitajn por la apero de tiu Raporto. En ĝi troviĝas la diversaj paroladoj de la kunvenintoj ; la plenaj diskutadoj pri la lingva komitato ; pri la centra komitato aŭ Ligo ; k. c.. Jen parto de parolado de nia Direktoro « *Karaj gefratoj ! La koroj de ĉiuj estas plenaj je frataj* » sentoj. Sed ĝis nun oni parolis nur pri la frateco inter diversnacionoj. Mi esprimas la deziron ke per Esperanto, « ankaŭ fratiĝu la diversreligianoj, (aplaŭdoj) ke ĉiuj pastroj » katolikaj kaj protestantaj, hebreaj kaj rusortodoksaj, per « Esperanto unuiĝu kaj fratiĝu (aplaŭdoj), por kune laboradi » al la universala frateco (aplaŭdoj ; duobla salvo.)

La Detala Raporto fermiĝas per la Oficiala Protokolaro de l'Kongreso. Oni povas aĉeti ĝin ĉe P-o Schneeberger, en Laŭfon (Svisujo),

ABONMONOJ RICEVITAJ

Plenan abonmonon ni ricevis de

F-ino Lagoguey, Paris. — S-oj Champion, Avignon. — Isidore, Wolhwhude (Belgl.). — Thomès, Fixeur (Germanl.). — Ĉetverikov, Kamenetz-Podolsk. (Rusujo). — De S-e Mattelaër (Lovenjo) ni ricevis 9 fr. sen klarigoj.


Plenigitaj abonoj de : J. Wemaes (Lovenjo). — S-ino Macary, Lyon. — S-o Slater, Higher-Openshaw (Angl.). — Denoncin (Reims). — Chairou (Rueil).

Ni *insiste, insistege*, petas niajn abonintojn ne ankoraŭ pagintajn, ke ili bonvolu kiel eble, plej baldaŭ sendi sian abonmonon.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o J. Ellis, el Keighley Anglujo),
LECIONO VII. — Ludo specimena, daŭrigata.

NIGRO



BLANKO

Pozicio post kiam N iris 10-e.

11. S — 4 ĈD

Fiu-ĉi ne estas la plejbona iro, sed ĝi malhelpas N-on ataki BRK-on per Ĉ al 4 TD.

....11. S — 3 ĈR

12. D — 3 K

Nun vi vidas ke la ŝakigo ĉe10-a iro malŝparis tempon, kaj helpis N-on pli ol B-on. Post ne longe, vi eltrovos, ke la tempo vere estas gravega parto de la kapitalo de ŝakludanto. Malŝpari ĝin estas riski la venkon.

Ju pli frue la Ĉ-oj kaj K-oj foriras for de la 1-a vico, des pli bone; precipe se ili pligrandigas sian potencon.

13. Ĉ — 3 Ĉ

Car NK estas ne protektata de alia peco, N interŝanĝas la K-on, por ke li ne malŝparu la tempon, retirante ĝin al 2 Ĉ.

14. TD × K

Plibone estus kapti per TR, por havi ambaŭ T-ojn pretajn por ataki la R-an kvartalon, se la damflankaj S-oj antaŭeniros.

14. S — 4 TR

15. S — 4 D

Tre plibone estus 15... S × S. B nun havas oportunon por fari lertan iron.

16. S — 5 D!

17. S × Ĉ

18. S × S.

15. S — 4 ĈD

16. S × K

17. S × Ĉ

Kvankam B estas perdinta du pecojn, kaj gajninta nur unu, li havas fortan atakon Reĝen. Sed tie ĉi li eraras; li devas movi 18 D-3D, atakante NDTs-on. La BS sur 6D estas tre utila, malliberigante la kontraŭan R-on.

.... 18. S — 5 T

Neatentante la eblojn de B.

19. S — 4 Ĉ

Ankoraŭ preterlasante la okazon. Li devis irigi D-on al 3 D; se tiaokaze NR al 2 T, B detruos la TS-on per T — 1 T, kaj se N permesos al B, ke li prenu la TS-on, B ŝakmortigos per D — 7 Ĉ.

.... 19. S × S pasante

t. e. N formovas de la tabulo NRC S-on, kaj metas sian FTS-on sur sia 6 ĈR.

20. D × S

Ankoraŭ ne ekvidante la gajnon jam elmontritan. Se 20. S × S, N povus kapti la TS-on, kaj poste movi TD al 1 T. Turoj tiel samliniigataj estas ofte tre fortaj.

....20. Ĉ × S

SOLVO DE PROBLEMO 6-a

(E. E. Westbury)

1^a iro de B estas D. 8 D

Se N ludos R.3KD

2 D.5D

» » R.5ĈD

2 D.8KD×K

» » K.2R

2 K.5TD

» » K.3D

2 D.6D×K

» » Ĉ.5D

2 K.6D

» » Ĉ.5ĈD

2 K.6ĈD

» » K.6ĈD

2 K.5TD

» » S.5ĈD

2 D.5D

» » S.3aŭ 4ĈR

2 K.5TD

Ĝuste solvis : S-o Rebouveau (Tours). —
Sendu la solvojn *rekte* al la Direktoro de E. K.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj monate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

IL CITTADINO ITALIANO, duonmonata gazeto en Itala lingvo, raportas pri Esperanto kaj pri L. I. Enhavas bonegajn tradukojn de D-ro Josefo Loschi, Profesoro en Valòmbrosa *Reĝa Instituto Forsta*. Konsistas el 16 p. kiel *l'Esperantiste*. S-ro P-ro J. Meazzini, de Arezzo (Ital.) ricevis de la Direktoro la taskon redakti la esperantajn aferojn, artikolojn, anoncojn, bibliografiojn, ktp., kaj eĉ ricevi la abonpagojn el eksterlando (jare 3 fr. 50).


➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO; PENSIO por gesinjoroj, Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House; 17, St-Stephen's Square; London-Bayswater.

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ, de ĈEFEC, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. — Estas nun aĉeteblaj: la angla, germana, franca, itala, hispana, rusa, kaj sveda eldono, kaj riceveblaj po 3 fr. 50 la centon (100). Ĉiulandaj poŝtsignoj estas laŭ efektiva valoro akceptataj. — Je la sama adreso POŝTKARTOJ kun teksto kaj adreso de diversaj naciaj societoj esper. — Po 1 fr. 35 la centon (100).

LE COLLECTIONNEUR UNIVERSEL, Karto-Filatelisto



kaj literatura revuo. — Konkursoj kun premioj, anoncoj senpagaj por l'abonantoj. — 10.000 legantoj. Jarabono 2 fr. (en Franci. 1 f. 50). Specimen. 15 centim. Direktoro Cl. Guinot, 38, r. de Chalon, Le Creuzot.



La Revuo

Internacia monata literatura gazeto kun la
konstanta kunlaborado
de D-rò L. L. ZAMENHOF

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura, ĝi enhavos : novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povus naski disputojn estos malakceptita de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de Septembro 1906 okaze de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto: ĉiu numero, 0 fr. 50 ; jara abono, 6 fr.

Oni povas jam de nun aboni ĉe la Librejo Hachette et K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris.

« TRA LA MONDO » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco, industrio ; militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA. — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5^e.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

VERKOJ de D-ro NOEL (aĉeteblaj ĉe Espero Katolika). — Ĉielo kaj Tero, de Byron, trad. 1 fr. 45. — Rolandkanto, trad. en versoj, 1 fr. 70 a frank. — Parolado pri la Metodo, de Descartes, litografiita verko, 24 p. en granda formato.